

Tra la Mondo

TUTMONDA ILUSTRATA REVUO ESPERANTISTA

TRA LA MONDO ESPERANTO SEMAS SIAJN BONAĴOJN.
 PLI FACILIGAS LA KOMERCAJN, INTERRILATOJN, KONIGAS,
 LA INDAJN, ELTROVOJN, KUNHELPOS POR ANSTATAVI
 DE FRUKTODONA PACO, LA SANGAJN BATALADOJN,
 KIUJ DISSTRAS HOMARON.



Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de l' granda premio.

Jara abono : 8 frankoj. ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo
Pri Esperanto: Antaŭfesto de la II ^a Kongreso en Frankfurt, de D ^o Hanauer el Frankfurt (Germanujo)	33 ^a
Kelkaj diroj de D ^o Zamenhof, kolektitaj de Augusto Montrosier	33 ^a
La Genève Kongreso (Svisujo), de Aŭdinto, Th. Rousseau, k. t. p.	35 ^a
Kongresa Aldono: Plena Parolado de D ^o Zamenhof dum la Kongreso	
Virina paĝo: La korseto, de D ^o Dumas kaj Roksano	39 ^a
Diversaj sciencoj: Historio kaj Arkeologio. — La ruinoj de Wisby, de P. Hedstrom (Svedujo)	40 ^a
Turismo: Adelboden, de Th. Hopf (Svisujo)	42 ^a
Diversaĵoj: Kuriozaj kutimoj el multaj landoj	45 ^a
La Proceso de l' Botejoj, de Frederic Mistral (Provenco), esp. de J. Flourens. Familio de Grandeguloj en Douai, de E. Philippe (Francujo)	46 ^a
Miksaĵoj: Por la propagando, problemoj, trimonata konkurso, k. t. p., de Ch. Brunet	47 ^a
Felietono: Poŝta amo, de Johano Munoz kaj Pabon	48 ^a

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al:


Gazeto « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenvalore.

Ni ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de « Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la adresŝanĝojn nur laŭ peto AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas represi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata ĈIAM CITI LA DEVENON DE l' ARTIKOLO, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.



« Tra la Mondo » kaj la propagando.

Jen nova fakto montranta la efikecon de « Tra la Mondo », por la propagando.

« Per la specimeno, kiun vi sendis al mi, mi varbis 6 adeptojn kiuj, vidinte tiun belegan revuon, fervore eklernis Esperanton. »

ALFONSO MISTLER,
profesoro en Tokio, Japanujo.

Tiu ekzemplo, facile aldonebla al multaj aliaj similaj, devas instigi niajn legantojn dismontri kaj diskonigi « Tra la Mondo ».

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo ».

Por ebligi tiun propagandon, ni eldonis belajn ilustritajn poŝtkartojn, kies specimeno ni aldonis al nia lasta numero, kaj kiuj kostas tre malkare, precipe se oni aĉetas ilin pograndede. Jen estas la temoj de ili, elĉerpitaj el artikoloj presitaj en « Tra la Mondo ».

- La granda « Puĝa » (Hindujo).
- La antikvaj arenoj en Béziers (Francujo).
- La « Suk » en Tunis.
- La vinberistaj festoj en Vevey (Svisujo).
- La pentekosta rajdado en Ung Hadish (Moravujo).
- Mzaba puto (Alĝerujo).

Ni varme instigas niajn amikojn uzi tiujn malkarajn poŝtkartojn.



POR LA PROPAGANDO.

La bufoj — La bufo ne hav'as en ĉiu'j land'o'j la mal'bon'a'jn ec'o'j'n, kiu'j'n ni kon'as al ĝi. Kiam la nigr'ul'o'j afrik'a'j est'as ĝen'at'a'j per kap'dolor'o'j pro sun'varm'ec'o, ili si'n frot'ad'as la frunt'o'n per viv'ant'a'j bufo'j, kio ili'n mult'e kviet'ig'as.

La bufo'j de « Antilles » hav'as la karn'o'n tiel bon'a'n kaj delikat'a'n kiel tiu de ni'a'j ran'o'j; kaj, kiel ili est'as tre dik'a'j, du el tiu'j bufo'j sufiĉ'as por prepar'i bon'a'n plad'en'hav'o'n, kiu'n oni prezent'as sur tabl'o kok'id'frit'ig'it'e.

El « La Revue Scientifique »

esperantigis 7968.

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesiĝi je Esperanto, donante samtempe la gepatralingvan « ŝlosilon » de Sinjoro Ĉefeĉ.

NUNTEMPAĴOJ

La II^a Universala Esperanta Kongreso. ANTAŬFESTO DE LA KONGRESO.

Nia multe amata majstro havis la grandan afablecon bonvole akcepti la inviton de la Frankfurta Grupo, esti dum kelkaj horoj ĝia gasto. Li alvenis matene kaj ripozis kelkajn horojn en la esperante flagita domo de la prezidanto, S^o KÜCHLER. Je la 5^a la samideanoj — ĉiuj kiuj povis estis liberaj de aferoj — salutis nian doktoron en la konata palmena ĝardeno, kie oni rigardadis kaj prave admiris la belajn plantojn, arte flegitajn.

Malgranda festeno — kvazaŭ antaŭkongreso — malfermiĝis per la Esperanta himno, kiun estis prilaborinta por granda orkestro, la afabla kaj nelacebla direktoro KÄMPFERT. Jam atendis en la esperantista kafejo senpacience la



S^o SEIDEL. S^o BARTHEL. D^o ZAMENHOF. S^o DELIGNY (Fr.)
D^o MYBS. S^o SCHÜCK.

D^o ZAMENHOF EN FRANKFURT.

nun ankaŭ en Germanujo komencis triumfadi la mirinda verko de Zamenhof.

D^o HANAÛER, el Frankfurt,
Lingvakomitano.

granda aro da grupanoj, amikoj kaj reprezentantoj de diversaj unuigoj, ĉe kiuj la Frankfurta grupo estis aranĝinta paroladojn dum la lastaj monatoj. Kaj ni ne povas esti sufiĉe dankemaj al nia majstro por la granda afableco, je kiu li havis la bonecon elparoli impresplenajn vortojn en germana lingvo. Multkolora serio da deklamaĵoj, kantoj, paroladoj tre amuzis ĉiujn ĉeestantojn kaj kvankam la nombro ne estis treege granda, la granda kaj kora ĝojo montris, ke

Kelkaj diroj de Doktoro Zamenhof.

La intervjuo, kiun prenis de Doktoro Zamenhof, la lastan jaron, nia redaktoro, havis tro da sukceso, por ke li ne penadis kolekti ankoraŭ kelkajn dirojn de nia majstro. Jen estas la resumo de ili.

Les Marécottes, la 4^{an} de Septembro 1906.

En tiu ĉarma kaj agrabla restejo, ĉe *esperantista loĝejo*, mi penadis ordigi la multajn impresojn interesajn, kuraĝigajn kaj ĝojigajn, kiujn mi kunportas de nia 2^a universala kongreso.

Laboro ne facila pro laceco de tri monatoj plenigitaj je okupoj troegaj, sekvitaj de dek tagoj dum kiuj, ĉu la kongresaj kunsidoj, ĉu agrablaj festoj kaj ekskursoj, ĉu la serĉado de amikoj kaj intimaj interparoladoj, lasis al mi nenian liberan minuton.

Tiom da gravaj faktoj okazis, tiom da atentindaj personoj mi vidis kaj aŭdis, tiom da esperoj naskas la ĵus fininta kongreso, ke mi timas esti ne konfidinda historiisto, forgesante ion ĉefan.

Sed, fakte, ĉu mi jam bone ne estos plenuminta mian taskon, se mi transdonos al niaj legantoj la juĝon kaj la opinion mem de nia majstro.

Do, tiun ĉi matenon, antaŭ ol foriri por serĉi trankvilon sur monton, mi eniras la hotelon, kiu havas la honoron lin loĝigi, kaj super kies pordego flirtas ankoraŭ nia verdstela standardo, kaj mi sendigas al la Doktoro mian vizitkarton.

De la hotela vestiblo, ĉirkaŭita de galerioj per kiuj oni aliras la ĉambrojn, mi sekvas la serviston per okuloj : ĝi malfermas pordon, ĝin transiras kaj baldaŭ eliras sekvata de l' Doktoro, kiu, per mansigno akompanata de afabla rideto, alvokas min.

Surpaŝante la ŝtupojn kvarope, mi rapide supreniras, premas ĝoje la manon kore aligitan al mi

kaj enpenetras la ĉambron de l' Doktoro, kiu jam laboras kun sia frato Leon'.

La ĉambro, kompreneble, ĉar estas frue en la mateno, ne estas jam ordigita. Sed, diras la Doktoro, li ne volis atendigi la redaktoron-amikon de «Tra la Mondo». Li mem rememorigas pri la intervjuo, kiun mi prenis de li en Boulogne, kaj pri la promeso, farita skribe, kaj dediĉita al la legantoj de nia gazeto, ĉeesti la 2^{an} kongreson. (1)

Tiu promeso retenis lin kiam, iafoje, li pensis ne veni en Genève. (2)

«Li timis, ke oni tro faros bruon ĉirkaŭ lia nomo. Ne pro modesteco li timas ĝin, sed ĉar iaj personoj eble ne ŝatas, ke oni ligas la tutan Esperantan aferon kun la nomo de iu homo. Oni aplaŭdu « Esperanton », sed ne lin. Li deziras esti nur iu Esperantisto, kiel la aliaj; se oni ĝin volas, oni konsideru lin kiel la flagportanto, sed la aklamoj iru sole al la flago.

Ekzemple, post la elŝipiĝo, je la fino de l' Vevey' a tago, kiam multaj kongresanoj akompanis min, antaŭirata de l' verda standardo, ĝis mia hotelo, estus estinta multe pli bone se nur la standardon oni estus akompaninta, sen krioj je mia honoro.»

Tiu temo priokupas multe la Doktoron, kiu penadis komprenigi al la organiza komitato sian deziron, kaj kiu petas min ankoraŭ insisti pri tiu punkto. Lia frato rimarkigas prave ke se, oficiale, oni povas plenumi lian deziron, estas tute neeble « ŝtopi la buŝon » de fervoregaj kaj entuziasmegaj samideanoj. Oni povas nur diskonigi, kiel eble plej multe, la deziron de D^{ro} Zamenhof.

Do ni atentu, kaj penadu kriu ne «Vivu Zamenhof» sed «Vivu Esperanto».

La priokupo de l' nia bona majstro montriĝas ankoraŭ kiam la interparolado ekuŝas la demandon pri « ĝenerala festa tago de l' Esperantistaro ».

Aludante la forjeton de la ideo, mi rimarkigas ke, eble, la kongresistoj malbone komprenis la gravecon de l' propono de nia amiko Otto Simon (3).

«Estus efika propagando okazigi, dum la sama tago, la festojn, kiujn havas jam multe da esperantistaj anaroj. Ja, nun, la plimulto el la lokaj naciaj gazetoj aludas tiujn festojn. La fakto ke, en intertempo de kelkaj tagoj, la preskaŭ ĉiunonda gazetaro parolos pri Esperanto farus grandegan impreson al la publiko; nia festo estus kvazaŭ la tago le l' 1^a de Majo por la laboristoj, kies graveco devenas precipe de ĝia universaleco, kaj de l' atentigo de l' gazetaro pro tiu universaleco kaj ĝeneraleco mem.

— Vi estas tute prava respondas la Doktoro, kaj mi parolis favore por la ideo, kiam mi respondis al la propono de S^{ro} Otto Simon en la « Germana Esperantisto »; sed la tago proponita — tiu de mia naskiĝo — estis tute malbone elektita, kaj pro tio, post miaj diroj kontraŭ tiu dato, la propono malprosperis.

— Sed, mi diras, ĉu oni ne povus elekti, se ne la naskiĝan tagon de l' elpensito, tiun de l' elpensajo.

— Jes, tre bone, kontente diras Doktoro Zamenhof. Tiu dato troviĝas inter tiuj, kiujn mi proponis en la jam aludita respondo. La dato je 17^a de Dec. tute taŭgus, ĉar ĝi rememorigus la veran naskiĝon de Esperanto, kiam, kun entuziasmo neniam atingita, mi kaj kelkaj kungimnazianoj festis ĝin en Varsovio, antaŭ ol disiĝi. (4).

— La dato efektive estus bonega, aldonas D^{ro} Leon, sed kelkaj personoj timas, ke ĝi estus tro proksima je Kristnasko,

kaj eble malhelpus la preparadojn de tiu festo, tiel grava ĉe multaj popoloj, aŭ estus ĝenata de ili ».

D^{ro} Zamenhof ne ŝajnas havi tiun timon; do, karaj gelegantoj, pripensu l' aferon, ankoraŭ unufoje tiel gravan por la diskonigo kaj atentigo pri Esperanto.

Kompreneble la festo ne estus devigata, en la lokoj kie ĝi estus antaŭtempa, sed estas dezirinde ke, pli kaj pli, en la sama tago, oni festu Esperanton.

Ni parolas nun pri la kongreso, kaj D^{ro} Zamenhof juĝas ĝin tute sukcesinta.

Multaj progresoj estas faritaj de la unua, iom improvizita. La agado de l' organiza komitato estis tre valora antaŭ kaj dum la kongreso, ekzemple pri starigo de l' protokoloj. De nun ni havas seriozan bazon por la estontaj kongresoj.

Tamen estas ankoraŭ plibonigoj efektivigotaj. Ekzemple, kun mi la Doktoro konsentas pri la neceseco de kunsidaj tagordoj antaŭe fiksitaj, tiamaniere ke la kongresanoj konos antaŭ la kunsidoj, kaj tiel povos pripensi la demandojn diskutotajn. Ankaŭ estos necese resendi al specialaj komisioj, kiel mi proponis, la demandojn tuj nesolveblajn.

Fine, ĉar unu el la ĉefaj rezultatoj de l' II^a kongreso estis multobligo de l' specialistaj kongresetoj, D^{ro} Leon Zamenhof rimarkigas ke estus ankaŭ necese ke tiuj kunsidoj estus antaŭanoncitaj sufiĉe frue, tiamaniere ke oni partoprenu en ili kun antaŭpripensitaj ideoj kaj projektoj.

«Pro la granda sperto de niaj anglaj amikoj, pro la granda rolo ludata de Britujo en la monda koncerto, D^{ro} Zamenhof ĝojas pri la unuanima akcepto de Anglujo por la venonta kongreso.

La ĉiama sekretariejo starigita de la 2^a Kongreso estos valora helpo por la organizantoj de l' kongreso, kies sidado en Anglujo havos grandan signifon ».

Fine D^{ro} Zamenhof ĝojas pri la konsento kaj la paco, kiuj regis dum la tuta kongreso.

«Kompreneble, ne estas eble ke homoj, eĉ esperantistoj, intervivadas ĉiam pace, sed iliaj malkonsentoj devas esti nur privataj aferoj. Tio rilatas neniel la Esperantismon, nek interesas la esperantistaron.

Pensante nur al Esperanto, ni do klopodu por ke nia 3^a kongreso estu ankoraŭ pri brila, multnombra kaj efika ol la du aliaj ».

Nun Doktoro Zamenhof estas baldaŭ ironta al sia inda edzino, ĉar ne povas esti por li ripozo nek ĝojo malproksime de ŝi. Tamen li devos, post kelke da tagoj apudpasigitaj, reiri sola Varsoviajn, — kien alvokas lin iliaj profesiaj okupoj — ĝis kiam la urbo pacigos.

Tie li povu ricevi kuraĝigajn sciigojn pri la kreskanta florado de Esperanto dum la venonta jaro; tiuj ĉi decidigu lin veni nepre en Anglujon.

Ni ne forgesu ke tio dependas iom de ni, kiel mi diris laŭ lia peto.

A. MONTROSIER.

(1) Vidu la aŭtografon de D^{ro} Zamenhof sur la 18^a paĝo de nia 1^a Jaro.

(2) Per malgrandaj literoj ni donas la penson, kaj ne la vortojn mem, de D^{ro} Zamenhof.

(3) S^o Otto Simon proponis, letere pro malsano kiu malhelpis lin ĉeesti la kongreson, ke oni kreu festatagon, en kiu ĉiuj societoj, grupoj kaj izoluloj esperantistaj festus Esperanton kiel eble plej bone.

(4) Pasante, D^{ro} Zamenhof rimarkigas ke en la letero, kie li aludas tiun feston, ruse skribita, estas traduka eraro pri la dato, kiu estas la 5^a de Dec., malnovastile, sed la 17^a, novastile.



Fot. Mallet.

ANTAŬ LA FESTENO ĈE « LES BASTIONS ».

La Genèva Kongreso.

Genève.

Urbo banata de suno kaj radianta, admirinda lago kun bluegaj akvoj, impresigaj montegoj super kiuj staras Monto Blanka, akceptis la kongresanojn kaj ne ĉesis, dum la tuta kongreso, surmeti siajn plej belajn solenajn vestojn.

En la aero flirtas festa venteto; ĝi kraketigas gaje la esperantistajn flagojn, kiuj fiere montriĝas je l' balkonoj, sur la tegmentoj de multaj Genèvaj loĝejoj.

Iom post iom alvenas la kongresanoj, kiuj tuj aliras al la sekretariejo, transigita en la Komercan Lernejon, kie laboras febre la multaj organizantoj kaj komisiitoj.

La ekspozicio estas la templo de l' laboro. Ĝis la horo de l' malfermo, la elmontrantoj pretigas «siajn bateriojn», kiel dirus nia amiko Åhlberg, sub la alta direktado de S^o Berthelot, kiu, samtempe, zorgas pri la dutaga eldono de «*Esperanto-Journal*».

Tie ĉi kaj tie, malpli multaj ol en Boulogne, aŭ malpli videblaj pro la grandeco de l' urbo, kelkaj surskriboj, en komercaj vitrafenestroj, «*Oni parolas Esperante*». Kiam do ni vidos, ĝenerale uzatajn, la bonegajn surskribojn kaj verdajn stelojn, tiel facile surglueblajn, elpensitajn de nia fervora kaj lerta amiko Kùchler, prezidanto de l' Frankfurt'a grupo.

La prepara kunsido de l' lingva komitato, en kiu jam partoprenas sufiĉe da anoj estas bonega okazo religi, buŝe, la interrilatojn komencitajn en Boulogne.

La oficiala malfermo

donas al ĉiuj kongresanoj la saman eblon.

Multaj virinoj ĉeestas en la rangoj de l' kongresanoj kaj, fakto atentinda, ili estos inter la plej fervoraj dum la laboraj kunsidoj. Pli ol dekvin landoj aŭ lingvoj estas reprezentataj: angla, ĉeĥa, itala, germana, franca, hispana, hinda, svisa, rusa, pola, dana, katalana, hungara, sveda, belga, flandra, amerika, kanada, holanda, finna, skota, irlanda, k. t. p., tamen unu lingvo, *de ĉiuj same parolata*, esprimas la entuziasmon de l' kongresanoj kiam, je la 3^a horo, eniras D^{ro} Zamenhof akompanata de sia honora helpantaro.

Longa ovacio salutas lin kaj Esperanton, kiam li alvenas sur la estradon.

Apud li sidigas: dekstre generalo Sébert, prez. de l' organiza komitato kaj S^o Eduard Bernard, prez. de l' loka komitato; maldekstre, pastro Schneeberger, prez. de l' S.E.S. kaj rektoro Boirac, prez. del' L. K. Malantaŭe sidas la membroj de l' O. K.: S^o Gaston Moch, prez. de «*Espero Pacifisto*», D^{ro} Mybs, prez. de G. E. S., kolonelo Pollen, prez. de B. E. A., S^o Michaux el Bulonjo, kaj la sekretarioj de l' Kongreso.

Post kiam D^{ro} Zamenhof malfermis la kongreson, generalo Sébert dankas la lokan komitaton, precipe la prezidanton kaj la ageman sekretarion, Edmond Privat; poste S^o Gaston Moch, sek. de l' O. K. legas tre gravan deklaron pri la esenco kaj neŭtraleco de Esperanto.

Lau tiu deklario, estos nur permesate preparoli en la oficialaj kongresaj kunsidoj, la demandojn

« ne kapablajn instigi bedaŭrindajn disputojn inter la esperantistoj, kies ĉefa bezono estas l' unueco por la venko de l' lingvo kara je ili, » ekz. aplikadojn utilajn, jam faritajn, aŭ farotajn, de Esperanto por la sociala vivado. Por la malpermesitaj demandoj, estos arangeblaj *privataj* kunsidoj en ejoj speciale rezervotaj por la interesatoj.

Post tiu legado, la kongreso faras gravan voĉdonon. Post legado de interesa kaj luma raporto de generalo Sébert pri la organizado de l' kongreso, oni decidas uniforman organizadon por niaj estontaj Esperantaj kongresoj. La organoj estos direktanta komitato de l' kongreso, kies prezidanto kaj vic-prezidanto apartenos al la lando kie okazos la kongreso, kaj ĉiama sekretario: la Centra Oficejo, kies rolo montriĝis tiel grava dum la organizado de l' 2^a kongreso.

Post bonveno donita al la kongresanoj de pastro Schneeberger, al kiu generalo Sébert transdonas la prezidantecon, estas levata la kunsido.

La kongresanoj kunvenas poste, nacie, por elekti oficialajn delegitojn, kiuj formas kvazaŭ honoran gvardion por Doktoro Zamenhof dum la solenaj malfermaj kaj fermaj kunsidoj, kaj povos paroli je l' nomo de siaj nacioj. Inter ili, por Francujo, troviĝis nia ĉefredaktoro.

Solena malferma kunsido en Victoria Hall.

Antaŭ plenega ĉambrego malfermiĝis la kongreso, en la belega Halo Victoria, nun konata de niaj legantoj per la fotografiaĵo enhavita en nia lasta numero. Multaj estis la geesperantistoj, kaj ankaŭ la neesperantistoj uzintaj la eblecon ĉeesti la vesperfeston, pri kiu estis tiel parolata en Genève, de kelke da tagoj.

Tial, kiam li eniras sekvata de sia honora sekvantaro, je l' impona sono de l' orgeno, entuziasma, korega, tondra akcepto estas farata al tiu, kiu volus esti nur Esperantisto, eble konsiderata kiel aparte sperta kaj klera, kaj en kiu, tamen oni ne povas deteni sin vidi la Majstron, la gloran elpensinton al kiu iras la korajn pensojn de l' homareto kunigita de lia genio.

« Donu al mi apogponton, diris Archimède, kaj mi sublevos la mondon. » D^{ro} Zamenhof sciis ne sole al tiuj uzantaj ĝin la necesan apogon, t. e. la fido


en la Estonto, bazita sur la grandeco de l' verko plenumota, ĝiaj nekalkuleblaj konsekvencoj por la homaro unuigota, kun la tempo, en sama penso de interkonsento kaj de homa frateco; bazita ankaŭ sur la indeco imponanta de la vivo kaj de l' agoj de Zamenhof.

Kiam, iom post iom la bruoj estas ĉesinta, kiam ĉapeloj, poŝtukoj kaj ventumiloj estas reordigitaj, ekparolas S^o Fr. Schneeberger, prez. de l' S. E. S. kaj ankaŭ, apud D^{ro} Zamenhof, de l' kongreso.


Elokvente, li salutas la landojn reprezentatajn en la kunsido, li dankas la diversajn komitatojn kaj sindonemulojn, kiuj helpis por la organizado de l' kongreso, kaj finas per alvoko al la ĉeestantaj Genève'anoj: la finiĝanta jaro vidis kreski Esperanton en Svisujo laŭ admirinda florado; certe Genève'anoj, konvinkitaj de tio, kion ili tuj vidos kaj aŭdos, ne volos prokrasti, de malfrua aliĝo, la finan sukceson de tiel bela afero. Kiam silentiĝis la aplaŭdoj, li donas la parolon al generalo Sébert, prezidanto de l' organiza internacia komitato.

Tiu ĉi dankas la preparintojn de l' kongreso, kaj elokvente tradukas la esperojn de l' ĉeestantoj.

Poste Rektoro Boirac, la distingita prezidanto de l' Boulogne'ano kongreso, montras la gravan rezulton akiritan de tiu kongreso kaj la grandajn progresojn faritajn, dum la pasinta jaro, de Esperanto, kiun, poete, li komparas al aglo.



LA KOMERCA ĈAMBRO.
Sekretario de l' Kongreso.



Fot. R. de Lajarte.

LA FESTENO ĈE « LES BASTIONS ».

Pri Esperanto

Fine S^o Edouard Bernard legas france, kaj S^o E. Privat tradukas Esperante, belan leteron de l' eminenta filozofo Naville.

Pro manko da spaco ni ne povas enpresi hodiaŭ tiujn tri elokventajn, alparolojn, tamen kompostistajn, kiujn ni enpresos en la venontan n^o.

Parolado de D^{ro} Zamenhof. (*)

D^{ro} Zamenhof nun leviĝas kaj estas salutata de senfina kaj emocia ovacio.

Li venas, li diras, de lando kie oni batalas por la libereco kaj por la homaj rajtoj.

Li aludas la okazantaĵojn de Bjelovstoko, sia naskurbo, sangoplenigita de longe pro malpacoj, kies unu el la kaŭzoj estas la diverseco de l' lingvoj kaj sekve la interkompreniĝa neebleco por la diversgentaj homoj.

Do « Kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la dum tiu parolado, nek dum la alparoloj de l' naciaj delegitoj, neniu el tiuj neesperantistoj eliris.



Fot. Mallet.
FORIRO AL OBERLANDO BERNA.
Gesinjoroj Schneberger.



Fot. Mallet.
GENĚVAJ KOMITANANOJ.
Monod H. Hodler
Soj Bernard E. Privat

gentoj iĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. » Kaj por ke la laborado estu fruktoporta, Doktoro Zamenhof opinias, ke li devas antaŭ ĉio bone klarigi la internan ideon de la Esperantismo.

Kiel esperantistoj, nia devo estas resti neŭtraj, kiel klarigas la deklaro akceptita en Boulogne-sur-mer; sed kiel homo, ni havas la rajton ne vidi en Esperanto nur aferon praktikan.

Kaj kun kortuŝaj akcentoj de l' koro, Doktoro Zamenhof ekkrias ke li preferus « neniigi kun doloro la laborojn kaj oferojn de sia tuta vivo, forĵeti malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur sia brusto » sedes ol eviti ĉion idean en sia agado.

(Granda emocio.)

Ĉar se la esperantistoj ne estas tiel naivaj por kredi, ke internacia lingvo starigos la universalan pacon, tamen la ideo de Esperantismo enhavas en si signifon superan je tiu de l' utileco praktika kaj nedisputebla de la lingvo. Pli ol la praktika celo, estas la ideo de l' estontaj bonfaroj alportebaj al la popoloj kaj gentoj de la universala lingvo, kiu gvidis lin en lia tasko. Kun ĝojo, en Boulogne-sur-mer, tiuj personoj, kiuj sentas kiel li, « sentis, ke komenciĝas la falado de la muroj inter la popoloj, ili sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco. »

Kun ĝojo ankaŭ ili sekvas la progresojn nunajn de Esperanto, videblajn aparte per niaj kongresoj « kiuj fortikigos en ili la amon al la interna ideo de la Esperantismo, kaj iom post iom, niaj ĉiujaraj kongresoj farigos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco. »

Tiu parolado, ofte substrekita de varmaj aplaŭdoj, faras grandan impreson.

Estas tute rimarkinde, ke multenombra ĉeestantaro neesperantista, kiu sidas la superajn galeriojn, montras tre grandan intereson kaj ke, nek



Originalo de AFIŜO DE L' KONGRESO. S-ro de Koninck.
Unua Premio de l' konkurso.

neesperantistoj, invitas ilin konsideri senpartie la kongreson kiel atesto de l' vivforto de Esperanto.

Tre bela poezio de Doktoro Léon Zamenhof, frato de nia majstro, finas la kunsidon.

Unufoje plie, tiu lasta montris la unuformecon de l' elparolo de Esperanto en la buŝo de pli ol 20 personoj reprezentantaj 15 diversajn lingvanarojn.



Fot. Mallet.
TRI HISPANAJ SAMIDEANOJ.
L^{do} Klo Ayza. Abato Guinart. Estaban.

(*) Ni intencis doni nur analizon de tiu parolado; sed, dum la verkado de tiu numero, ni ricevis tiom da petoj por plena enpresado de legantoj sciigitaj letere pri la graveco de la parolado, ke ni decidis ĝin eldoni kiel aldono. Ni faras ĝoje tiun novan oferon, al nia kara lingvo.

La solena ferma Kunsido.

Ĝi okazis, kun la sama ceremoniaro kiel la malferma, en la belega « Victoria Hall ».

La ĉambrego estas plene kaj la neesperantistoj estas ankoraŭ multenombraj, kio pruvas la sukceson de l' kongreso por la loka propagando.


Ĉiuj atente aŭskultas la paroladon de S^o Schneeberger, kiu konstatas la brilan bonefektivigon de l' Kongreso kaj resumas la laborojn.

Post plenumura alparolo de K^{lo} Pollen, je l' nomo de ĉiuj fremdaj kongresanoj, oni havas la surprizon aŭdi flamajn strofojn dediĉitajn al Esperanto kaj al ĝia elpensito, de juna talenta Genèva poeto, S^{ro} Paul Hyacinthe Loyson; kaj du junulinoj, vestitaj per la nacia svisa kostumo, alportas al D^{ro} Zamenhof kronon el laŭro ornamitan per rubandoj kaj floroj.

Tre kortuŝata tiu ĉi dankas per kelkaj vortoj: revenante al sia plej ŝatata penso, li diras ke tiuj elmentroj sin turnas ne al li sed al la ideo de homa frateco, kiu inspiris liajn laborojn, al kiu la esperantistoj devas resti fidelaj.

Grandega akklamado salutas tiujn noblajn parolojn; kaj kore kaj entuziasme, starigintaj, la ĉeest- l' orgeno ludanta la belan muzikon de S^{ro} de Mènil.

AŬDINTO.



Fot. R. de Lafarte.

DOKTORO ZAMENHOF.

Sur ŝipo « Winkelried ».

antoj ekkantas ĥore « La Esperon » je l' akcentoj de Tiel finiĝas, apoteoze, tiu bela Kongreso.

La estonta Kongreso.

Ĝi okazos en Anglujo, dum Aŭgusto 1907. Tion decidis Pollen; la elekto de l' ejo estas lasita al la Angloj.

Senprokraste, tiuj ĉi kunsidis post tiu decido, kaj komencis esperablan de ilia organiza lerteco. La kunsido estis sekreta sed, laŭ privataj kaj fidindaj sciigoj, ni povas diri ke, krom tute neatendita malhelpo, la kongreso okazos en Cambridge (Kembrig), urbo proponita de l' distingita prez. de l' ĉi tiea grupo, D^{ro} Cunningham.

Tuj kiam niaj amikoj estos starigintaj sian organizan komitaton, tiu ĉi vizitos la diversajn ejojn okupeblajn por la kunsidoj, kaj definitive fiksos la ĉefajn punktojn de l' tuta projekto.

Ni povas aldoni ke nia amiko, la konata S^o Bolingbroke Mudie, sekretario de l' organiza komito, intencas dediĉi sian preskaŭ tutan jaron al la organizado.

Ĉiuj grupoj kaj societoj, ĉiuj esperantaj kaj esperantistaj gazetoj laboru por alkonduki multajn geesperantistojn al la kunveno fiksita de niaj agemaj transkanalaj samideanoj.

T. L. M.

Morto de D^{ro} Lloyd.

La fino de l' Genèva kongreso estis malgajigata de la malapero de unu el niaj britaj samideanoj, la distingita D^{ro} Lloyd kiu trovis la morton dum ekskurso apud Genève.

La serĉadoj faritaj de Britoj inter kiuj kolonelo Pollen, de lia bofilo — alvenita tuj de Anglujo —, de la Svisa policistaro, estis longe senrezultataj. Fine montano trovis en Rodano la senvivon korpon de nia malfeliĉa samideano.

Ĉiujn niajn kondolencojn al la familio de nia bedaŭrata amiko.

A. M.

unuanimege! la gekongresanoj laŭ propono de Kolonelo ekzameni la plej bonajn rimedojn por atingi la sukcesegon



Fot. Mallet

EN VEVEY.

Gaje flirtas la verdaj Standardoj.

Ni jam ricevis multe da interesaj memoraroj de l' kongreso. Niaj legantoj kiuj faris fotografajojn, aŭ kiuj konas fotografintojn estas petataj sendi aŭ sendigi, KIEL EBLE PLEJ FRUE por ke ni povu fari elekton, provajojn NE GLUITAJN SUR KARTONON, kaj iom nigrajn.

« T. L. M. »



C Oxenford

La Korseto de Doktoro Dumas.

Estas ja hodiaŭ aŭgusteniam, kiam mi tre riskas prediki en la dezerto: Kuragi ataki la korseton, kia malsaĝaĵo!

Tio estas forgesi, ke ĝi havas sian devenon ĉe la plej malnova antikveco, kaj ke ĝi estas elpensita, kaj ĉiam defendita de la virina koketeco. Ĉetere, de alte venis l' ekzemplo. Se oni kredas al Homero, citita de D^{no} Bouchacourt, el kies verko mi ofte ĉerpis por la historia parto de tiu ĉi artikolo, se oni kredas al Homero: « Kiam diino Junono volis plaĉi al Jupitero, ŝi prunteprenis de Venuso la zonumon, kiu igis pli videblaj la ĉarmojn. de ŝia talio ». Zonumo iganta pli videblaj la ĉarmojn de la talio estas ja la naskinto de l' korseto.

En Ateno, kaj poste en Romo, tiuj zonumoj estis almetataj senpere sur la haŭton, kaj estis tre altaj.

En Francujo, se oni kredas la tradicion, la korseto estis uzata unufoje, en la XII^a jarcento, de buĉisto kiu tiamaniere volis malhelpi, ke lia edzino tro babildu. Se tiu ĉi buĉisto sukcesis, la korseto de li uzita kredeble neniel similis al la korseto, kiun portas la nuntempaj sinjorinoj!

Laŭ Leroy, la korseton naskis l' imito de la kiraso, kiun surmetis la junuloj dekkvinjaraj. Tio ĉi estas tiom pli kredinda, ke dum Ludoviko XI^a kaj Ludoviko XII^a, oni donis la nomon « korseto » aŭ « korseleto » al la malpezaj kiraso, kiujn portis la junuloj.

Dum Francesco I^a aperis la « baskeno », korsaĵo havanta kvazaŭan formon de funelo, kun tola substofa, provizita per kupraj fadenoj, kaj havanta ĉe la antaŭa parto lignan, ostan aŭ ŝtalan buskon, sur kiun oni ofte enskribis devizon rilatantan al Kupido.

Al Katerino de Medicis ni ŝuldas tiujn terurajn metalajn kirasojn, kies kelkajn modelojn oni vidas al la Muzeo de Cluny (Kluni). « L'epoko de Katerino de Medicis, diris Solovieff, de ŝiaj regantaj filoj kaj de ŝiaj koketaj filinoj estas la plej pereiga epoko por la sano de la posteularo ». Ho ve! Tiu abomeninda reĝino multe pli malbonfaris al la viroj per la Sankta Bartelemio, ol al la virinoj per sia korseto-kiraso.

Dum Henriko IV^a, diris S^{no} Butin, oni per larĝaj rimenoj pligris ankoraŭ la kunpremiĝon de l' korseto; ĝi estis la korseto-gravedkaŝilo, kiun iafaje bezonis la amikinoj de l' reĝo. En la 1619^a jaro, juĝo de l' Parlamento en Aix^{malpermesis} la diritan korseton; ĉu la tiutempaj sinjorinoj submetiĝis je tiu ĉi juĝo? Estas permesite dubi pri tio; ĉar tuj de la unuaj jaroj de l' regno de Ludoviko XIV^a, la korseto tiel kunpremis, ke al ĝi oni donis la nomon « ĝust' al korpo ». Iom poste, tamen, ĝi estis preskaŭ forlasata: S^{rino} de Montespan, l' amantino de la reĝo-suno, por kaŝi siajn ok gravedojn, ekmetis la robojn tute ne ĝustalfaritajn. Vi tre malmulte konus la homan karakteron — mi aludas la tiutempan homan karakteron kaj ne la nuntempan, oni facile

povus erari — se vi dubus unu solan momenton pri la rapideco kun kiu la sinjorinoj kaj fraŭlinoj de l' kortego anstataŭigis la korseton per la neĝustalfarita robo. Estas vere, ke multe da tiuj ĉi virinoj havis por tion fari saman kaŭzon kiel S^{rino} de Montespan.

Sed kiel tiuj antaŭirintaj ŝin, S^{rino} de Montespan ĉesis plaĉi, kaj la rigida S^{rino} de Maintenon, kiun la dukino de Orléans nomis « tiu maljuna malagrablulino » rapidis renaski la modon de l' korseto. Ŝi estis transpasinta l' aĝon, je kiu oni riskas bezoni robojn tute neĝustalfaritajn; en okazo kontraŭa, ŝi ankaŭ estus surmetinta ilin.

Poste, Jean-Jacques Rousseau kaj Buffon varmege atakis la korseton, kaj se ili ne sukcesis eligi ĝin el la modo, almenaŭ ili sukcesis por tio, ke ĝi fariĝis pli fleksebla. Ĝi restis tia, ĝis la elegantulinoj de l' Direktorio kiuj, en sia kaprico por « reveno al la Naturo », forlasis la korseton. Ili plie faris, diris Lacour, ilin sin vestis tiamaniere, ke ili ŝajnis sin gravedaj. Tute reveno al la fruktodona Naturo! Pli multe ol tio faris S^{rino} Tallien; ŝi surmetis vestaĵon, kiun ŝi nomis « je la sovaĝulino ». Kaj ĝi estis tiel travidebla, ke ĉiu vidis ja, ke la virino kiu ĝin portas tute ne estas sovaĝa.


En la daŭro de la Unua Imperio, la korsetoj denove refariĝis modaj, kian ajn malkontentiĝon sentis pro tio l' Imperiestro: « Tiu vestaĵo malsatinde koketa, li diris ian tagon al Corvisart, kiu kontuzas la virinojn kaj kaŭzas damaĝojn al ilia idaro, elmontras nur vantajn gustojn kaj antaŭsentas al mi baldaŭan ruiniĝon ». Tio estis eble troigo, sed kiam la « idaro » estis en danĝero, Napoleono plu ne havis moderecon; tian konsumadon li faris el ĝi!

Dum Karolo X^a oni estis tre premata per la korseto; ankoraŭ pli dum Ludoviko-Filipo, sed ĝi estis pli fleksebla; sed tuj de la 1840^a jaro revenis la kiraso kun balenostoj, kiun la Revolucio estis kunpreninta kune kun tiel multaj aferoj. De tiu ĉi epoko ĝis la fino de l' jarcento, la korseto ŝajnis esti elpensita nur por sublevi la bruston kaj plilongigi la buston.

Nuntempe, se la modo ne ŝanĝiĝis kiam eliros tiuj ĉi linioj, la antaŭa parto de l' korseto imitas la « ĝust' al korpon »; solaj la malantaŭaj kaj flankaj partoj estas arkkurbigitaj. Sub ĝia premo, la ventro malaperas, kaj la virino ŝajnas diri: « Vi vidas ja, ke mi ne estas graveda kaj neniam estis tia ». Tamen ni konfesu, ke ĝi ne plu kunpremas la stomakon, malpli puŝas malsupren la abdomenajn internajojn.

(Daŭrigo venos en la 4^a No.)

Esperantigita de
ROKSANO.



Kopirajto.

WISBY'AJ RUINOJ.
S^{ta} Drotten k. S^{ta} Laurentius.

La Ruinoj de Wisby.

Originale verkita kaj ilustrita de P. HEDSTROM (Svedujo). (1)

S^{ta} Nicolaüs estis *Dominikana* preĝejo. Samokaze kiel kelkaj preĝejoj en la norda urboparto starantaj, ĝi estis detruata dum militiro de l' *Lübeck*'anoj kontraŭ *Loren Norrby* en la komenco de la 15^a centjaro.


En la suda urboparto estas *S^{ta} Hans* ruino, la sola kiu meritas atenton. Kiel estas antaŭe dirite, multaj estintaj preĝejoj tute malaperis, kaj de kelkaj restas nur malmultaj fragmentoj, apenaŭ indaj « meti sur folion » kiel figuro. Do, la intenco kun tiuj linioj estis nur doni mallongan priskribon pri la plej vidindaj ruinoj, kaj per fotografaĵoj vidigi ĝiajn eksteraĵojn, por iom elvoki veran imagon pri la — oni povus diri, la grandioza — ruiniĝo kiu regadas en Wisby, urbo plena je antikvaj memorajoj el la pasintaj tempoj.

Sur monto lokita je unu kilometra interspaco, norde de *Wisby* troviĝas jarcentaĝa ekzekutloko, nomata « *Pendiga monto* », kie tri ŝtonoj pendigaj donas al la tuta ebenaĵo, malgajan impreson. Cetero neniu rimarkinda objekto troviĝas en Wisby'a ekstermura ĉirkaŭaĵo. Tamen, eble la ŝtonkruc

starigita sur kampa sudoriente de la urbo, povus altiri atenton, ĉar tie enterigitaj estas kune ĉirkaŭe 1800 bravaj Wisby'aj defendintoj, kiuj mortefalis dum la sanga batalo inter Gallandanoj kontraŭ la batalionoj de l' Dana reĝo *Waldemar Atterdag*. Ĝi okazis la 27^{an} de Julio 1361 ĉe la suda pordego de l' urbo. La nomita batalo estis la plej danĝera por *Wisby*'.

Kiam post tri venkoj, la Dana reĝo triumfe eniris la urbon, tra la disbatitaj muroj, tiam la venkitaj urbanoj kredeble antaŭsentis, ke la fiera epoko de

ilia fortika urbo proksimiĝas al la fino. Laŭ historio, la venkinto kun siaj soldatoj marŝis rekte al la *Granda bazaro* apud *S^{ta} Katharinae*; tie stariginte provizoran tronon, sur ĝin sidiginte, kaj ĉirkaŭinte sin de armitaj militistoj, la reĝo ordonis, ke oni alportu grandajn barelojn kaj plenigu ilin per ŝatindobjektoj, kiel militimpostoj. La ordono estis obeita, kaj tri bareloj plenigis per juveloj, or- kaj arĝentaĵoj. Tiam okazis, diras legendo, ke monaĥo, ĵus alportinte juvelujon, starante antaŭ la reĝo, kuraĝe levis manon kaj ĵuris je



Kopirajto.

APUD WISBY.
Pendigaj monto (Malnova ekzekutloko).

(1) Sekvo kaj fino, vidu la 2an Non.

la ĉielo, ke la rabanto neniam kun siaj rabaĵoj revenos Danujon. Oni povas pensi kion ajn pri tiuj antaŭdiroj de l' monaĥo; tamen la fakto estas, ke, dum transportado de l' prenitaj impostoj al Danujo, la ŝipoj subakvigis pro ventego kaj la riĉegaĵoj estas bone kaŝitaj, kredeble por ĉiam, en profundaĵoj de Balta Maro je nur kelk-kilometra interspaco de Gotlanda marbordo. Ofte oni aŭdas strangajn legendojn pri tiuj subakvigitaj oraĵoj, rakontataj de superstiĉemaj homoj; kaj ankoraŭ ian vesperon je bela vetero, kiam la suno subiras sub la vidlimo okcidenta, superŝutante la maran supraĵon per la brilo de siaj lastaj radioj, tiam ian maljunan Insulaninon, ekrigardante la rebrilon de l' Baltamaraj ondetoj, oni povas aŭdi dirantan: « *La Valdemar* riĉegaĵoj briletas, tio antaŭsignas alian veteron ».

Insulo Gotland eĉ est-



Kopirajto.

WISBY'AJ RUINOJ.
Interno de *S^{ta} Katarinae*.



Germanbohema Ekspozicio en Reichenberg, 1906.

Ni intencas interesi la legantaron de « *Tra la Mondo* » mallonge priskribante kelkajn sufiĉajn klarigojn pri tiu ĉi grava ekspozicio.

Unue kelkaj vortoj pri Urbo *Reichenberg*. La urbo kuŝas en ĉarmega valo, proksime de l' rivero « *Neisse* » ĉirkaŭita de girlando de la densaj montaroj « *Iser* kaj *Feschkten* » kie monto « *Feschkten* » estas alta je 1010 metroj. Post la ĉefurbo *Prago*, tiu ĉi malnova urbeo (ĝi ekzistas de 1300) estas la dua en Bohemujo. Ĝi kalkulas 40000 loĝantojn aŭ pli ol 70000 kun la antaŭurboj, kies plimulto estas germanaj. Grandega industrio havas sian centron en *Reichenberg*, kiu pro kvin fervojoj, senĉesa konstruada evolucio, publikaj diversaj institucioj, propra komunuma regularo, k. t. p. certe meritas la fieran nomon de « *Metropolo de Germanbohemujo*. »

La ekspozicio prezentas gravan pruvon de l' agemo pli kaj pli potenca de la germanoj de Bohemujo.

Ĝia loko kovras supraĵon da 400000 [1]2, kaj estas ĉirkaŭita de belaj arbaroj. Al la ĉefpordo kondukas tri stratoj. Tuj kiam la vizitanto eniris, li opinias efektiviĝi la fabelon mondfaman de « *la mil kaj unu noktoj* ». Belegaj ĝardenoj prezentas al la okuloj mirigataj bonvenan verdaĵon; grandega aleo longiĝas tra la ekspozicia teritorio, kies malebenaĵo, naskinta valetojn, montetojn, arbaretojn, donas por la ĝenerala vidaĵo tute originalan ĉarmon. La fremdulo ekkhaltas kaj longe rigardas tiun ĉi ravan spektaklon.

Maldekstre de la ĉefpordo, ni vidas la monumenton de *Imperiestro Josef II^a*, kaj la urban domegon de *Reichenberg*, kiu enhavas inter multnombraj aĵoj, mirindan kolekton da pentraĵoj, donacitan de *Barono Liebiĝ*. (*Valoro: pli ol unu miliono da Kronoj*). Pli malproksime jen estas la halo por la vaporkaldronoj, en kiu estas enmurigitaj ses vaporkaldronegoj produktantaj la necesan forton por la tuta maŝinaro.

Sed kio estas tiu ĉi konstruaĵo, kiu altiras nian atenton pro sia grandego kaj beleco? Tio estas la ĉefdomego de l' ekspozicio, kie estas kvin grandaj haloj kovrantaj supraĵon da 22000 [1]2 kaj longaj je 240 metroj laŭ la fruntflanko,

is restadejo por marrabistoj; kiel postsignon de tiu tempo oni elmontras kavernon de rabisto *Zilja*; ĝi kuŝas inter ŝtonegoj ĉe la marbordo je dek kilometroj sude de *Wisby*. Post tiu mallonga ekskurso ni reeniru la urbon, kaj donu nian adiaŭnan rigardon al ĝiaj temploj atestantaj tiom da pieco kiom da potenco.

Kvankamla plimulto estas ruina, tamen dum centjaroj, al la generacioj ili parolis klaran lingvon pri la eternaj netuŝeblaj leĝoj de l' aliformiĝo de l' materio, tiel same ili ankoraŭ dum longaj tempoj al niaj postnepoj rememorigados, ke eĉ la plej firmaj fortikaĵoj estas pereemaj, kaj fine devas kunfalegi.

(Fino).

P. HEDSTROM,
el Rossön (Svedujo).

La 3^a klišaĵo de l' unua artikolo reprezentas *S^{ta} Spirit* preĝejon kaj ne *S^{ta} Katarinae*, kiel estas presite erare.

La unua el la kvin haloj enhavas precipe diversajn maŝinojn je 1200, 800, 600, 400 H. P., kiuj produktas la necesan elektran lumon. La meza solena halo altigas sian fieran kupolon je 53 metroj, kaj enhavas ekspozicion tre interesan pri la progresadoj de la germanaj urboj, de la minejoj, de la metiaj lernejoj k. t. p. En la aliaj estas maŝinaĵoj, tekseblaĵoj, ŝtofaĵoj, vitraĵoj, unuvorte la ĝenerala pririgardo de la germanbohema industrio.

Nun ni haltu sur la ĉefplaco, kie la okuloj lacigitaj povas ripozi antaŭ la verdaj arbaroj de l' montaroj tre proksimaj. Sur la plej alta loko, tre bone troviĝas la Restoracio de l' *Gablouzer-bierfarejo*, kie ni ĝuas agrablan refreŝiĝon, aŭskultante belan muzikantaron.

Ni daŭrigu la viziton. Ni trovos vidindajn halojn, domojn, turojn, magazenojn por arbara, bestara, terkultura ekspozicio; teatrojn, *Pilsner* bierejon, vinejojn, fiŝejojn, k. t. p.


Sed la *samideanoj* ekvidos plezurege la ĉambron modestan, kie la grupo esperantista de *Reichenberg* elmetis la esperantaĵojn. Ŝajnas al ni, ke super la vastega ekspozicio, malgranda verda stelo disjetas lumeton, kiu pli kaj pli brilas, kaj lumigas, samtempe kaj simile, la landon de ĉeĥoj kaj de germanoj. Tie ĉi ĉiam ĉeestas grupanoj sindonaj, kiuj plezure prezentas al la fremdaj geesperantistoj siajn bonajn servojn.

H. RUDOLF,
el Reichenberg.

La aktiveco de l' grupo estas ankaŭ montrita de la fondo de 3 sekcioj. La lasta, en *Tetschen* a. E., naskiĝis post plensukcesa parolado farita la 4^{an} de Aŭgusto, de l' nelacebla *P^{ro} Otto Simon*, pri la interesa kaj grava temo « *La Lingvo Internacia en la instruado kaj la komerco* ».

Estas espereble ke, baldaŭ, formiĝos granda kaj potenca unuigo esperantista en la germana Bohemujo,

Laŭ letero de *EM. BOBEK*,
Sek. de l' *Reichenberga* grupo.



LA VALO DE ENGSTLIGEN KAJ WILDSTRUBEL ADELBODEN

Adelboden

de TH. HOPF (Svisujo).

Oscar Hoff, eldonisto, Thun.

Adelboden. 1350 m. s m. en Oberlando, berna estas plej malantaŭe en la valo de Engstligen. Se oni supreniras en poŝtkaleŝo, de Frutigen, oni traveturas longan intermonton arbaran, preskaŭ ne trovante ian dometon. Tamen, post du horoj da vojaĝo, la valo eklarĝiĝas, kaj la plej belaj floraj kampoj, sursemitaj je brunaj dometoj en la oberlanda stilo, estas videblaj. Supre de la verdaj herbejoj de la altarbara zono, ŝtonegoj kaj glaciaj montoj rigardas en la valon, sendante akvofalojn kiel saluton. La natur-sceno de Adelboden ne estas grandeca, sed trankvila. Kiel ŝanĝa ĝi estas! neniu tago estas sama kiel alia; ĉiam novajn lumadojn produktas la suno. Ĉiu vojo kaj ekskurso havigas novajn vidaĵojn, se nur oni scias observi atente. Antaŭ ĉio frapas, ke la valo ne estas unuforme fermita; sed diversajn valojn oni trovas inter la montaroj. Estas kvin valetoj, kiuj estas ordigitaj kiel la fingroj de mano.

Maldekstre brilas la blanka longa dorso de Wildstrubel enkadrigita de la rigidaj ŝtonegoj de Zohner kaj Amerteagratt. Tiuj krutaj amasoj ripozas sur molaj verdaj montdorsoj, kiuj, kun siaj abioj, akvofaloj kaj montodometoj, formas naturan parkon, tiel belan, ke oni ne povas deziri ĝin pli bela. La fundon plenis la paŝtistejoj, domoj, arbaretoj kaj riveretoj. Oni tie marŝas sur modestaj vojetoj, sen polvo, en ŝanĝaj kurbiĝoj, supren kaj malsupren, ĉiam ĝuanta novan ekvidaĵon. Ĉie silentaj loketoj logas al sidiĝo kaj ripoza ĝuado. Kiom da homoj

oni renkontas, kun libro aŭ kraĵono en la mano! Kiom da ĝojaj bandoj marŝas laŭ ĉiu direkto, serĉantaj la vidindajn celojn.

Tre amata promeno estas la Bütschegg, prezentanta vidaĵon al la malfermata valo de Frutigen, flankita de la longa ĉeno de Niesen. Oni vidas ĝis Beatenberg kaj Sigriswylrothom, super la lago de Thun. En la kontraŭa direkto, ni marŝas tra arbaro al valetto de Stigelschwand, kie oni trovas altan kaj dikan abion, nomatan Schermtanne (ŝirmilabio), arbo je 6 metroj da amplekso. De tie oni supreniras montojn Albrist kaj Gsür, altajn je 2700 metroj. La najbara valetto estas Gilbach, tra kiu kondukas la alpojo de Hahnenmoos al la Kuraca stacio Lenk, malantaŭ la granda longa valo de Simmen.

Dekstraflanke, plilarĝiĝas la valetto de Boden kun la altaj akvofaloj de Engstligen. Apud ili, oni supreniras per stonega vojeto al la hoteleto de Engstligenalp, ĉe la piedo de la glacia Wildstrubel; de tie oni iras al ĝia supro kaj al la multuzata alpvojetto de Gennui

al Wallis. Alia promeno al Bondertal kondukas tra maldensa arbaro, kun belegaj ekvidaĵoj al la montaro kaj la tuta valo, poste, tra herbejoj, antaŭ la vertikalaj ŝtonegaj muroj de Lohner kun iliaj multaj akvofaletoj. Tiu ŝanĝado inter la ĉarmo kaj la grandego, la elekteleco de multaj aliaj promenadoj, pli grandaj ekskursoj kaj montiradoj faras el Adelboden ideala somerrestejo, precipe ĉar oni



ĜENERALA VIDO DE ADELBODEN.



Oscar Höpf, eldonisto, Thun.

VILAĜA STRATO KAJ PREĜEJO.

trovas ĉie riveretojn, kiuj malvarmetigas la aeron kaj gajigas la migrulon per sia murmurado.

Al la ĉarmoj de Adelboden, apartenas ne nur la pejzaĝo, la vegetaĵaro, la brunaj dometoj kaj ĝiaj loĝantoj, sed ankaŭ la bestaro, precipe la korna. Tiu vere estas la fiereco de la oberlanda kamparano.

Se li ricevas premion por bela bovido aŭ vendas ĝin bone, li estas pli feliĉa ol se lia edzino kaj liaj infanoj fartas bone. Tiele pensas la kamparano, kaj li pli rapide kuras al kuracilo por sia brutaro ol por siaj familianoj. Oni ne imagas, kiel simple tiuj loĝantoj vivadas. Multaj pensas, ke tiuj homoj estas la plej feliĉaj kaj bonfarantaj, ĉar ili ĉiam vivadas en la pura aero, kaj povas trinki bonan lakton. Kaj la vilaĝano kredas, ke tiaj estas la urbanoj, kaj ne suspektas, kun kiom da zorgoj ili venas tien supren por fortiĝi por la batalado por la vivo. Tiel malkonas unu la alian. Mi nur diras, ke malsaneco estas iom ofta inter la montaranoj, ĉar la bona lakto estas donata al la bovidetoj, la laboro estas malfacila kaj la vivmodo ne higiena.

Kaj se malriĉa kamparano vivas eĉ tute sola en dometo, li preferas resti sola; liaj najbaroj nur rigardas ĉium matenon al lia domo por vidi, ĉu la fumo ankoraŭ supreniras el la kameno. Tio estas pruvo, ke li vivas. — Unu matenon la fumo ne plu eliras. — Li kredeble mortis, ni volas vivi. — Tute sola, li disiĝis de tiu mondo, kiu alportis al li tiom da suferoj. Tiel la sama

terloko estas al unu por resaniĝo al alia por penadoj.

La bovinoj, kiuj apartenas al la portreto de alpherbejo terurigas multajn virinojn elegantajn, kiuj malelegante forkuras, kiam tiuj kornulinoj moviĝas subite. Tamen ili estas tiel pacemaj, kaj la sono de la sonoriloj, kiujn ili portas je la kolo, sonoretas tiel ĝoje tra la alpa naturo vivigante ĝin! Proksimume je la tempo de la plej longaj tagoj la alpaj brutaroj estas loĝigitaj de la paŝtistoj. Unu duono de la familio iras sur la monton, kaj la alia restas hejme. Viroj kaj knaboj portas sur la dorso la necesajn ilojn, laktokaldronojn, fromaĝbordilojn, litajaron kaj aliajn aferojn. Matene je la 4^a

horo komencas la originala eliro; bedaŭrinde iom tro frue, por ke la dormema urbano ĝoju pri la senfina sonorado. Je la sekvanta mateno, dum la promenado ni renkontas ankoraŭ disajn grupojn da malgrandaj brutoj. Guste, sur ponteto, en la arbara ombro, venas unu el tiaj karavanetoj. Antaŭe, iras gruntanta porketo; ĝin sekvas du kaprinoj kaj bovidoj, kondukataj de infanoj. La malgranda kaprido rajte povas iri sola kaj uzas sian liberecon por salteti dekstren kaj maldekstren, kaj ĉien rigardi, kion novan ĝi vidas kaj aŭskulti kion la rivereto murmuranta diras. Tiun junecan ĝojon sekvas fine ankoraŭ la maljuna patrino kun baraĵo sur la dorso kaj unu sola bovino ĉe la mano. La vidiĝo estis tiel poezieca kaj pentrinda, meze de tiu ĉarma scenejo, ke ni rigardis ĝin, ĝis ili malaperis for niaj okuloj. Laŭirante nian vojon, ni alvenis al domo, kie sep ĝojaj



Oscar Höpf, eldonisto, Thun.

LA ĈENO DE NIESEN DE LA BRITSCHEGG APUD ADELBODEN.

infanoj rigardis min fripone de balkono kaj oferis al ni alpajn rozojn. Kiu povus malakcepti tiujn donacojn? Sed ankaŭ la maljuneco amuzis nin, ĉar ĉe la proksima dometo ni salutis maljunulon, kiu staris apud malgranda pura porketo, kiu flaras ĝoje en en la herbo. « Tiu ĉi estas pura malgranda porkido, ni diris. — Jes, sed se ĝi iam estos tiel maljuna, kiel tiu ĉi (li montris maljunulinon), ĝi estos ankaŭ



Tra Berna Oberlando.

S^{ro} Th. Hopf, apotekisto en Thun, redaktis, kaj S^o Oscar Hopf, eldonisto en Thun, presis, antaŭ ne longe, tiun gvidlibron, lukse prezentitan, enhavantan 30 tre belajn ilustraĵojn.

La kongresanoj, speciale tiuj kiuj partoprenis la ekskurson en Berna Oberlando, certe estis tre feliĉaj aĉeti ĝin kaj uzi ĝin dum sia vojaĝo. Sed ni volas precipe atentigi niajn samideanojn pri la reklamo, tiunmaniere farata, per Esperanto, por Berna Oberlando, de la Kongresanoj



Oscar Hopf, eldonisto, Thun.

RIVERETO EN MONTARBARO APUD ADELBODEN.



« La Revuo » eldonata de la firmo Hachette kaj K^{io} aperis dum la Genèva kongreso. Ruĝe vestita, ĝi havas la saman formon kiel la « Revue de Paris »; sed, kompreneble, ne havas jam ĝian dikecon al kiu, kiel diris al ni ĝia distinginda Direktoro, P^{ro} D^{ro} Carlo Bourlet, ĝi celos kun la tempo. « La Revuo » estas pure literatura, plenigante tiel mankon en nia gazetaro, kaj tre bone eldonita. Jen estas la enhavo de ĝia interesa unua numero, kiun malfermas portreto kaj verko de nia majstro:

L. L. Zamenhof: Revizoro (trad. el Gogol) Akto I. — F. de Mènil: La mortigistoj de Stradella. — V. Inglada: Mia poemo. — Leono Zamenhof: Mi aŭdas Vin. — G. d'Aulnaye: Ibsen kaj la Francoj. — V. L.: La Edziĝo de la Hispana Reĝo Alfonso XIII. — E. Boirac: Vizito de franca Universitata Esperantisto al Britaj Esperantistoj. — Bibliografio. — Kroniko.

Kiel iam la feinoj kunvenis ĉirkaŭ la lulilon de infano por deziri al li ĉiuspecajn kvalitojn kaj feliĉojn, same ankaŭ la redaktoroj de l'esperantistaj gazetoj ĉeestantaj en la kongreso kunsidis ĉirkaŭ mangotablo, laŭ peto de « La Revuo », por festi ĝian naskiĝon.

Ne povante ĉeesti tiun manĝon, ni deziris almenaŭ esti reprezentata en la amika anaro. Hodiaŭ, ni esprimas al nia nova kunfrato niajn sincerajn dezirojn por sukceso kaj progreso.

La plej bona, kiun ni povas fari, estas ke, baldaŭ, ne naskiĝu alia simila revuo. Flanklasante la fakajn revuojn (*Espero katolika, Espero pacifista, ...*) ni havas nun plenan *Esperantan* gazetaron: « Lingvo Internacia » (esperantista informado kun literatura parto); « Tra la Mondo » (familia revuo kun ilustraĵoj); « La Revuo » (literatura kun gravaj artikoloj).

Ŝajnas do ke, de longe, oni ne devos fondi similajn revuojn, kiuj nur povus konkurenci, sen profito, la jam ekzistantajn, vivantajn ovivotaĵojn nur per kreskantaj monperdoj. Pri tio tute prave parolis S^o Bord en la lasta N^o de « L'Esperantiste », aludante la tiel multenombrajn mortintajn revuojn, kies malapero instigas la esperantistojn ne plu konfidi al la novaj, kaj kies morto estas nur kapabla malutili nian aferon.


Estas al ni malfacile insisti pri tiu ĉi punkto, sed ni esperas ke, okaze, nia gazetaro memoros la tute ĝustan kaj atentindan artikolon de homo tiel klarvidanta propagandisto, kiel estas S^o Bord (1).

(1) Kompreneble, estas neniel celitaj, en tiuj linioj, la nacipropagandaj gazetoj, tute subtenindaj kiam ili estas bone redaktataj, kaj kiujn, efektive, ni ĉiam kiel eble plej multe subtenas je ilia naskiĝo. Oni povas nur konsili, pri ilia fondo, sekvi la ekzemplon de la U. S. A.-anoj: kiel ni anoncis, ili intencas fondi propagandan revuon; sed, laŭ letero poste ricevita, ili ĝin fondos « nur kiam ili havos sufiĉe de promesabonoj por esti certaj pri la sukceso ».

pli granda kaj dika. La virino estas 82, kaj mi mem 73 jara.

Tiu komparo estis amuza. — Tiel ni eltrovas ĉe ĉiu paŝo veran naturan homecon, gajan kaj malgajan. Sed tio, kion homaro ne donas, la naturo certe prezentas; tial faru provon pri restado en Adelboden. Tion konsilas al vi,

TH. HOPF,
internacia apotekisto.



Internacia gvidlibro.

kiuj revenintaj hejmen, en Francandon, Anglondon, Germanandon, Ruslondon, ke montris tiun broŝuron al siaj konatuloj, esperantistoj aŭ ne. Kaj se oni pripensas, ke tiu broŝuro estos ankaŭ disdonata de la grupoj en la tuta mondo, oni ne dubos ke la verketo de S^{roj} Hopf meritas la dankon de iliaj samlandanoj, kaj ke, laŭ ilia ekzemplo certe agos multe da Sindikatoj aŭ Societoj por fremduloj, aŭ eĉ privatuloj, en la landpartoj vizitindaj de la turistoj. — (Vidu anoncon sur la kovrilo).



« Du Rakontoj », de D. de Rothau. Tiu ĉi libreto estas duoble atentinda por la Esperantistoj ĉar, verkita originale en Esperanto, ĝi enhavas plie historieton kies temo estas Esperanto.

Tre lerte kaj amuzige, S^o D. de Rothau montras al ni, en « Esperantista Hotelo », tion kio povos esti unu el tiaj *somerrestadoj por Esperantistoj*, por kies kreado batalas tiel energie, kaj prave, kelkaj samideanoj, inter kiuj nia kunlaboranto Th. Rousseau; la distinginda P^o Ch. Lambert, de la Diĵona Universitato; kaj nia kunfrato « Esperanto-Journal ».

La pentrado de l' karakteroj de l' kunvivantoj — generalo kaj la sinjorinoj de Riaz, francoj; « The misses Gordon »; la ruso Kozakoff kaj la germano Klauŝpeter — estas vigle kaj malice farita; kaj la rakonto enhavas kelkajn spritajn satirojn pri la manio de kelkaj samideanoj pri ŝanĝoj kaj plibonigoj de la lingvo: la priskribo de unu el la kunvenoj de l' grupeto esp. de Jura — ĉar la hotelo sidas en S^t Cergues — estas tre fina kaj placa pentraĵo.

La alveno de l' juna leŭtenanto Robert Le Grand, kiun la ĉarmo de Eva de Riaz rapide esperantigas, enkondukas aman intrigon en la rakonton, kies finiĝo, facile ellernebla, montras ke Esperanto ne limiĝas krei komercajn aŭ sciencajn interrilatojn! Bona argumento apud la junulinoj kaj la panjoj dezirantaj edzinigi sian filinon.

« La blanka kastelo », estas rakonteto malpeze verkita.

La stilo estas bona, tamen la uzado de l' sufiksoj estas iafaje necerta; ankaŭ tiu de l' partipoj (estanta aŭ estinta); same ŝancelas iom S^o de Rothau pri la akuzativo montranta la daton aŭ la momenton (paĝoj 30 kaj 37). Estas fine kelkaj preseraroj, kiujn la presisto devus eviti.

Sed esceptante tiujn detaletojn, la « Du Rakontoj » meritas vere lokon en niaj libroŝrankoj; kaj mi opinias plie ke la traduko de « Esperantista hotelo » en naciajn lingvojn, kaj ĝia presado en ĵurnalojn, estos bonega rimedo altiri la atenton al Esperanto.

A. MONTROSIER.



La Procesio de l' Boteloj.

El « Memorskriboj kaj Rakontoj » de FREDERIC' MISTRAL'.

En Sankta-Mihelo ni havis ian pastron, kiun oni nomis S^{ro} Talon': negrava abato Avignon'a (Avinjona), malgranda, grasa, dikventra, kun vizaĝo ruĝa kiel kukurba botelo de almozulo. La ĉefepiskopo de Avignon forprenis de li la privilegion de la konfespreno, tial ke li tro levis la kubuton, kaj lin sendis al ni por malembarasi sin je li.

Kaj, por la festo de l' Sankta - Sakramento, okazis ke, ian ĵaudon, oni kondukis nin al Boulbon' (Bulbono), najbara vilaĝo, por ĉeesti ĉe la procesio: la grandajn por porti la bonodorfumilon, la malgrandajn por ĵeti florojn; kaj al S^{ro} Talon', tre maisaĝe, ho ve! oni faris la honorojn de l' baldakeno.

Ĉe l' momento kiam la viroj, virinoj, junulinoj malvolvis siajn teoriojn sur la stratoj tapetitaj per littukoj, ĉe l' momento kiam la religiaj asocioj movis ondolinie siajn standardojn ĉe l' suno, kiam la horistinoj, blanke vestitaj, per siaj virgaj voĉoj ekkantis siajn himnojn, kaj kiam, piaj kaj silentegaj, antaŭ la Sankta-Sakramento, ni agitis la bonodorfumilon kaj disjetis niajn florojn, jen subite bruo ekestas, kaj kion ni vidas, Dio bona! la kompatindan S^{ron} Talon', kiu, balanciĝante kiel sonorileto, kun la sankthostiujo en la manoj, la ora mantelo sur la dorso, aj! plenigis la tutan straton.

Tagmanĝante ĉe la pastra domo, laŭŝajne li trinkis, aŭ eble oni trinkigis lin iomete pli ol konvenas

da tiu bona vino el Frigolet', kiu tiel rapide varmigas la kapon, kaj la malfeliĉulo, ruĝa pro sia honto tiel same kiel pro sia vino, plu ne povis stari... Ĉiu el la du eklezioj vestitaj per dalmatiko, kiuj faris la ritojn kvazaŭ diakono kaj subdiakono, lin subtenis sub la brako; la procesio eniris; kaj tiam, S^{ro} Talon' foje antaŭ l' altaro, ekripetis: *Oremus, oremus, oremus*, kaj ne povis diri ion pli. Duope oni lin alkondukis en la sakristion.

Sed vi divenas la skandalon! Feliĉe, ankoraŭ, tio okazis en paroĥo ĉe kiu la *sankta likvoro*, kiel dum la tempo de Bakuso, konservis sian riton. Apud Bulbon', al la montaro staras malnova kapelo nomita Sankta Marceleno, kaj la 1^{an} de l' monato Junio, la Bulbon'anoj en ĝin iras procesie, ĉiuj tenantaj en la mano botelon da vino. La virinoj ne estas akceptataj, pro tio ke niaj edzinoj, laŭ la roma tradicio, en tempo pasinta, trinkis nur akvon; kaj, por kutimigi la junulinojn al tiu ĉi regulo, oni ĉiam diris al ili — kaj eĉ nuntempe oni



LA PROCESIO DE L' BOTELOJ.

diras al ili — ke « l' akvo beletigas ».

Abato Talon' ne forgesis konduki nin, ĉiujare, al la Procesio de la Boteloj. Foje en la kapelo, la Bulbona pastro sin turnis al la popolo kaj diris:

starigata la 18^{an} de Julio 1801, kaj se nun li estus ankoraŭ malpermesita, lia memoro certe ne mortus, ĉar lia nomo estas tro konata en la urbo. Ekzistas ja, la « Berce Gayant » (Gayanta lulilo); la ĉevalkuradejo estas la « Château-Gyant » (Kastelo de G.); la muzikistoj havas la arion de G., verkitan je lia honoro; estas ankaŭ Gayanta literaturo; fine la Douai'anoj estas fieraj, tial ke oni nomas ilin « idoj de Gyant ».

Kiel vi ĵus povis vidi, karaj gesamideanoj, Gayant estas tre populara en Douai; venu do vidi la Grandegulojn la proksiman jaron, vi estos kore akceptataj de la anoj de la nova grupo esper., fondita tie ĉi, antaŭ tri monatoj, dank'al la sindona organizinto de nia unua kongreso.

En Douai la 7^{an} de Julio 1906^a.

E. PHILIPPE.

Anby-lez-Douai (Nord) Francujo.

Miksaĵoj.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzaĵoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « miksaĵoj » La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2^e Krom esceptoj speciale dirotaj la solvoj devas esti sendataj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^e Divinintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4^e Por iaĵ konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.


PROBLEMO I^a (2^a jaro) (DE X... Y).

Al la vortoj: Kalk-pap-vel-lin, aldonu, mi petas, afikson ka legu novajn vortojn kiuj signifas: parto de la korpo — parto de libro — besto — grado de alteco.

Se vi elektos la verajn vortojn vi povos legi per la unua litero de la dua kaj de la tria vorto nomon de frukto.

PROBLEMO II^a (DE CH. BRUNET).

Elektu unu vojon por iri de A ĝis B tiamaniere ke ĉe ĉia kruciĝo de vojoj vi povu legi vorton prenante ĉiujn literojn ĉirkaŭ la kruciĝo. Ekz.: ĉe la unua kruciĝo montrita prenante la literojn R B I D O oni legas vorton: birdo aŭ brido. Kiuj estas la vortoj?



PROBLEMO III^a (DE X... Y).

Mi estas pronomo; legu min returnite, mi fariĝas la malon de vira estaĵo.

Rimarko. — La solvoj kaj tiuj de la junia numero estos akceptataj ĝis la 30^a de Novembro 1906^a.

SOLVOJ DE L' PROBLEMOJ (3^a kvaronjaro).

PROBLEMO 36^a.


T R E M P I
R E G O I O
A T I N G I
L A N D O J
A P R O B I

PROBLEMO 37^a.

tetrao — rateto — teatro
ankaŭ mi akceptis: kapro — karpo — parko

PROBLEMO 38^a.

Apartigu literojn enhavitajn en la pintoj de la esperantista stelo kaj vi ricevos la nomon: D^o ZAMENIHOV.



PROBLEMO 39^a.

Brogita kato timas la malvarman akvon.



PROBLEMO 40^a.

lutro — trulo — turo — truo
La nomaro de la divenintoj aperos kun la nomaro de la premioj en la venonta numero.

CH. BRUNET.

FELIETONO

Posta Amo.

Hispana, de JOHANO MUNOZ KAJ PABO'N, Noveleto.

Tradukita de JOHANO GARCIA MARTIN, el Ubeda (Hispanujo). (*)

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*

Amiko kaj Sinjoro. Mi rajtigas vin por al mi diri *ci*, sed neniel por insisti, kiel vi faras, pri kio estas neebla. Mi ne dubas pri via ĝisnuna bona humoro. Ĝi estas la plej bona maniero por klarigi al mi mem la serion da sensencaĵoj, kiujn vi konstante semadas en nian interkorespondadon, kiu, aliparte, kontraŭ mia volo, tre plaĉas al mi.

Via preskaŭ kolera amikino.

18, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mi petegas (pro la flugilhava infano de la patrino Venus'o, ke *ci* ne turmentu plu mian animon) ĉarmulino mia, per ciaj preskaŭ malpiegaj supozoj. Nenia bona humoro, kredu min. Mi estas sufiĉe honesta por ne igi el virina koro ludilon de mia kaprico. Estu do justa kaj pravigu, mi petas, la sincerecon de mia pasio. Ĉu *ci* volas ke mi ĝin ĵuru?

20, VI, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Ne, amiko Karolo, nenian ĵuron. Mi fidas al via parolo, kvankam mi tute ne scias klarigi al mi la kialon de tia pasio. Kion vi ekvidis, kreitaĵo de Dio, ĉe... tiu persono, por ke vi tiel sindoneme fordonu al ĝi vian koron? Tio supozigas ke vi havas tre belan koron kaj samtempe grandan bravegecon; sed eksci, mi petas, ke iun ajn malkonfidigas kaj malkuraĝigas karaktero tiel varmega.

22, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mi ekvidis kaj travidis tiel multe da bonaĵoj ĉe... tiu persono! Jen estas tio, kion mi vidis: animon de virino plej klera, plej ĝentila, plej kortuŝanta, kaj samtempe mi travidis virinon plej promesforgese-man, plej pasihavantan, plej sendecidan; fine mi vidis animon plej virinan kaj sekve plej adorindan ol iam povis enhavi homa korpo. Se ŝtono povus iam koni animon tiel belan, mi ĵuras, ke ĝi adorus ĝin same kiel tion faras plej energie cia blinda.

24, VI, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Vi estas senvalora kiel profeto. Oni konsideru la aferojn, kiujn tiu ĉi kreitaĵo vidis en animo tiel ordinara kaj vulgara kiel la mia! Se vi tiel sukcesis en la aferoj nur *ekviditaj* kiel en tiuj *viditaj*, vi prave

vin nomas blindulo. Tamen ĉu oni povas scii la rezultaton de via ekvido? Estos ja sciinda afero!

Via amikmodelo....

26, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Ofr'o sur cia frunto, ĉielo sur ciaj okuloj kaj paradizo de plezuroj je cia amo: jen estas tio, kion mi *ekvidis*, Marinjo tirana! Kial *ci* estas tia? Mi cin adoras kaj *ci* min forpelas; al soifanto de cia amo *ci* montras la akvon kaj *ci* ĝin forprenas kiam mi iras ĝin triuki... Mi vidas nur Tantalon kun mi komparebla. Eksci, Marinjo mia, ke mi estas malsana, malsana pro amego. Mia animo tre suferas: tion kredu. Kuracu min laŭ cia povo.

28, VI, 1906.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

S^{ro} Don Karolo, vi estas, kaj neniel mi, la mal-amiko de via feliĉo men. Via nedresita volo estas samtempe kaj la suferanto kaj la turmentanto. Mi vin certigas, per mia parolo, ke mi tre kompatas vian spiritan staton se, tamen, tio kion vi diris al mi per via lasta karto estas la vero; car, malgraŭ mia kontraŭvolo, vi fariĝis por mi interesaĵo, eble pli ol mi men imagas, kvankam mi ne paradas, kiel vi, pro tio, kion mi sentas aŭ ne sentas. Al vi deziras bonfarton....

30, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Marinjo mia, varmege amata! Ciam estu benata cia poŝtkarto, kiu tiom da bonaĵoj naskis en mi. Dio tion al *ci* pagu, kaj mi malmulte diras! Ĉu mi do fine interesis cin? Ĉu *ci*, ne paradante pro tio, *sentas* ankaŭ? Kaj *ci* volas ke mi ne insistu plu?! Jes, mi insistos, jes, certe. Respondu, ne preterlasante eĉ unu poŝtan tagon, dirante ke *ci* akceptas cian....

P. S. Ha! mi forgesis; diru *ci* al mi.

2, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Pripensu, Karolo, pripensu pro Dio, ke la leterportisto ĉestas la tutan detaladon de tiu proceso, kaj *ci* tute ne povas imagi la malafablan mienon, kiun li montras ĉiafoje, kiam li alportas al mi ian ajn el *ciaj* poŝtkartoj. Parolu do pli kaŝeme aŭ ni uzu kovertojn. Vi ja vidas kiel mi diras *ci* al vi kaj eksci, ke tia uzado min hontigas.

4, VII, 1905.

MARINJO.

(Daŭronta).

(*) Sekvo.

JOHANO GARCIA MARTIN,
(Hispanujo).

ESPERANTO INTERNACIA PRAKTIKO.

La Genèva Kongreso montris bonege ke, pli kaj pli, oni UTILIGAS Esperanton. Por kuraĝigi iri sur tiun ĉi praktikan vojon, ni malfermas novan rubrikon « Esperanto internacia praktikilo », kie ni raportos pri la uzado de Esperanto por difinitaj celoj.

Al la militistaj Samideanoj.

Komerco.

Leŭtenanto Bayol, instruanto ĉe la speciala militista lernejo, Saint-Cyr (Seine-et-Oise) Francujo, petas ĉiujn militistajn samideanojn sendi al li la jenajn sciigojn: (Respondi al la demandoj).

I. Stato de Esperanto ĉe l'armeo en via lando.

a Kiom (proksimume) da esperantistaj oficiroj? suboficiroj? soldatoj?

Kelkajn nomojn donu se eble. (nomoj de Generaloj ĉefe)

b Ĉu oni jam faris paroladojn, kursojn ĉe viaj militistaj lernejoj?

Ĉe viaj kunsidlokoj de oficiroj?

Ĉe viaj kazernoj?

c Kiu estas via antaŭopinio pri la venontaj progresadoj en via militistaro?

d Diversaj sciigoj.

e Ĉu via militministro ŝatas Esperanton?

Kiajn rimedojn por Lin interesi vi kredas bonaj?

II. Ĉe via maristaro?

III. Kiajn aplikadojn de Esperanto vi kredas eblaj militire?

Leŭtenanto Bayol petas siajn esperantistajn superulojn kaj kamaradojn bonvoli akcepti mil antaŭajn dankojn.

« Sekcio industria kaj komerca de l'Esperantista grupo Pariza, tradukas senpage leterojn, Paris, 21 Rue de l'arbre sec » Tia estas la enhavo de gumitaj surskribetoj, sendataj laŭ peto de la sekcio.

Se oni volas skribi Esperante al iu ne esperantista en Parizo, oni nur bezonas glui surskribeton sur angulon de sia letero. La ricevanto tuj scias al kiu sin turni por ĝin tradukigi.

Gratulojn al la praktika elpensito de tiuj surskribetoj, kiun ni bedaŭras ne koni. Estus bonege ke, por devigi la komercistojn atentigi pri Esperanto, oni faru mendojn en nia lingvo, uzante la priparolitajn surskribetojn kiel ĉi supre dirite.

Ni ricevis de nia korespondanto el Finnlando la tre interesan jenan sciigon.

« La 23^{an} de Julio okazis en Kotka granda kunveno de Finnaj komercoficistoj. Inter aliaj demandoj, oni demandis al la ĉeestantaro, ĉu ne estus utile uzi lingvon internacian Esperanto kaj fondi grupon de gekomercoficistoj en la tutmondo. La respondo estis unuvoĉe jesa, kaj de nun la lernado kaj la uzado de Esperanto skribe aŭ parole estas enskribitaj en la programon de la « Societo de Finnaj gekomercoficistoj. » Plie tiu ĉi societo petas la registaron enkonduki Esp. en la komerternejojn de Finnlando. »

Enketo pri maraĵoj.

Nuntempe, en Francando oni sin okupas tre aktive pri la instruado de la marŝipestroj, kaj oni baldaŭ ŝanĝos la programojn de la konoj postulataj de ili. Mi deziras enketi pri la maniero, laŭ kiu ĉi tiu instruado estas kondukata ekster Francujo, en ĉiuj nacioj. Tiun enketon mi tradukos en gravan francan revuon, montrante insiste ĝian devenon. Tio estos bona propagando en la ĝusta tempo.

Ĉiu helpu min! Oni ne kredu ke mi ricevos tro multe da respondoj, ĉar tiamaniere mi eble ne ricevus eĉ unu.

Petu demandaron de S^o RENÉ MESNY, 5, Rampe-Brest, Francando.

Malgrandaj nekomercaj anoncetoj.

Por plenumi peton de kelkaj Samideanoj, ni plimalgrandigis la koston de niaj nekomercaj anoncetoj:

Ĝi estas nun 1 fr. 25 por kvarlinia anonco (33 literoj en ĉiu linio). Ĉiu plua komencita linio kostas 25 cent (Pageblaj poŝtmarke).

Oni bonvolu skribi legeble kaj sur aparta papero.

15. — Guvernantinoj francaj, anglaj kaj germanaj, dezirantaj ricevi okupon

en Rusujo, povas sin turni al la aprobita de l' Ministraro Rekomenda Kontoro de Wasilewski, Marszałkowska 123, en Varsovio.

16. — S^{ro} Edward Gauntlett, Okoyama (Japon), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

17. — S^{ino} Egerton, *The Vicarage, Knottingley* (England), interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn kun alilanduloj.

18. — S^{ro} Arthur E. Baker, General-Delivery, Oklahoma, U. S. A., deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun samideanoj de ĉiuj landoj Ĉiam kaj tuj respondo. Ĉiuj kartoj sendataj estos uzataj por disvastigi la lingvon.

19. — S^{ino} Steenbuch, Sumoto, Awaji, Japanujo, interŝanĝas poŝtkartojn. Deziras nur bonfaritajn portretojn kaj famajn pentraĵojn. Sendu en koverto kiel presaĵo.

Rekomendata hotelo. — Pensionhotelo Fornay, en St Gingolph, Valais, Svislando, sur la bordo de Lemana Lago (prezo 5 fr.) « Tra la Mondo » legebla.

100 bonmiksita japanaj poŝtmarkoj, 1,50 fr. — Steenbuch, Sumoto, Awaji, Japanujo.

La fama firmo « Inkoj de Stephens » en Londono sendis al ĉiuj Esperantistoj, kies adreso ĝi trovis, kolekton da reklamoj, katalogoj, k. c. en Esperanto.

La aliĝo de tiu grava firmo al nia afero estas tre atendinda, kaj honorigas Britan Esperatistan Asocion, kiu ĝin akiris.

VIDU ALIFLANKE
LA ANONCO PRI NIAJ
NOVAJ PROPAGANDAJ ILUSTRITAJ
POŝTKARTOJ

Fervojoj de Paris ĝis Lyon kaj Mediteraneo.

La Kompanio ĵus eldonis artistan Albumon titolitan « Ilustrita Vojararo Paris-Simplon-Milan ».

Tiu albumo, kiu enhavas ĝeneralajn vidaĵojn kartografikajn, kopiojn per kvazaŭgravuro kaj plumdesegnaĵoj, estas aĉetebla po 0 fr. 50 en la bibliotekoj de l' ĉefaj stacidomoj de l' fervojaro; ĝi estos sendata ankaŭ hejmen laŭ peto akompanata de 0 fr. 60 poŝtmarke kaj adresita al la service central de l'Exploitation des chemins de fer P. L. M., 20, Boulevard Diderot, Paris (France).

Tra Oberland Berna

ILUSTRITA GVIDLIBRETO

de TH. HOPF, Apotekisto, Adelboden

aĉetebla ĉe OSCAR HOPF, Thun

svisa esperanta eldonejo.

(Prezo 50 centimoj).

LA FIRMO

“ Esperanto Verlag Möller & Borel ”

95, Prinzenstrasse, Berlin,

eldonis antaŭ la Genèva Kongreso novan poŝtkarton ilustritan per granda portreto de Doktoro Zamenhof. Ili estas tute rekomendindaj al la samideanoj. 10 ekz. m. 0,80 (1 fr.); 50 ekz. m. 3 (3 fr. 75), afr. al ĉiuj landoj.

La magazeno: Stefan P. Stojeff

Ĉirpan Bulgarujo.

Petegas ĉiuj magazenojn kaj fabrikojn okupantajn per vendado de l' manufakturaĵoj (aparte: katunoj, toloj), ke ili bonvolu sendi al ĝi siajn katalogojn kaj modelojn.

Oni respondas Esperante al ĉiuj demandoj.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, *oficiala* revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARABONO: 3 f. 75. Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

LA BELGA SONORILLO.

Bonega propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Unu el la plej malnovaj kaj seriozaj gazetoj Esperantaj.

Sciigoj — Literaturo — Scienco
Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

ESPERO PACIFISTA.

Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

ESPERANTA STUDENTO.

Ne plu estas publika gazeto.

Do ni ne plu ricevas abonon por ĝi.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

LA REVUO.

internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

UNUA PAŜO.

Monata bulgara gazeto en Esperanto. Pri-traktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^{ro} S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgario.

LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de 1^o komenciĝo de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to « Espero » en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bohstila literatura materialo: artikoloj pri la problemo de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj kaj bibliografio; sociala politika fako; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membrigo en la S-to « Espero ») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S^{to} « Espero. »

Sinjorinoj!

Se vi volas ne plu suferi je la monataj sangelfluoj aŭ je la epoko de ilia malapero, ensorbu la

DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendanĝeran produktaĵon, bombonforman, kiu tuj kaj certe forigos la doloron. Por havigi la Dragées Blottière, sendu 2,25 fr. post-aŭ kartmandate, 102, Rue Richelieu, PARIS.

JUNA ESPERANTISTO.

Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Sciencia kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^{ro} Marich Agoston, Pappnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S^{ro} Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N^o afrankita 0 f. 50 Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.
Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro} L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludo, k. t. p. Petu specimenon.

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
N^o 270,042. N^o 13,195
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŭŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTHLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprezare decifri kaj legi ĉion esperante skribitan » Emmeteblaj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, ilala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtŝignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Algerio;

1 f., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo »

fr. 1,50 ĉiu cent.

ĈE « TRA LA MONDO ».

Ilustritaj poŝtkartoj propagandaj.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO »

La serio (6 k.), afr.: 0 fr. 40

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monpapere.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.